



afrikume

afrika cirkulero de kultura centro esperantista
januaro 2006 - numero 2

suplemento al *Heroldo de Esperanto* n-ro 2082

redaktoro: Adjévi Adjé

grava anonco de Bakker
pri Afrika Oficejo en p. 4

Karaj amikoj,
Vi troviĝas ĉe la komenco de tute nova kaj interesa semajno. Por diri la veron: ankaŭ mi ne havas precizan imagon pri tio, kion vi lernos, kaj mi volonte estus kun vi por havi la samajn spertiĝojn pri la E-kulturo. Multaj E-istoj ne scias multon pri tiu kulturo. Des pli por ne E-istoj ĝi estas io ne komprenebla, kaj ili volonte mokas pri ĝi.

Ankoraŭ antaŭ unu monato la Eŭropa Komisiono, kiu estas kvazaŭ-registaro de Eŭropa Unio, oficiale komunikis sian opinion pri la lingvoj en Eŭropo. En tiu komuniko la Eŭropa Komisiono ne instigas al uzado de artefaritaj lingvoj, kiuj laŭdifine ne havas kulturajn referancojn.

Kaj jen vi per via nuna studado pruvos la malon. Mi esperas ke vi ĝuos la esploradon de tiu kampo, kiu povas riĉigi vian vivon. Se ĉio iros bone, tio ne daŭros unu semajnon. Vi ne ĉesos je la 3^a de januaro, kiam vi dankos kaj adiaŭos la eminentan docenton kiu nun gvidas vin. Sed vi uzos la novan jaron, kaj la jarojn poste, por daŭrigi vian studadon, kiu estas samtempe ĝuado.

Faru tion en sano kaj feliĉo. Tion mi deziras al vi tutkore.

Mi aldonas miajn korajn bondezirojn por sukceso al la docento, d-ro Giorgio Silfer. Lia instruado kontribuu al esperantista klereco en Afriko.

Hans Bakker

KCE kaj TIETo realigis unikan iniciaton

Mi studis pri la E-kulturo kaj -historio dum tuta semajno. Mi flegis mian komprenon pri la historio de la lingvo, kaj mi nun akiris novan energion por daŭrigi en Esperantio. Mi ŝuldas al AfrES, deklaris partopreninto ĉe la fino de la aranĝo, 28 dec 05 - 3 jan 06 en Lomeo.

La programo de AfrES konsistis el kursoj pri Esperantaj historio, literaturo kaj metodiko, (inter)lingvistiko, sociologio de Esperantio kaj ekstra enkonduko en bibliotekan administradon. La kursojn plibeligis filmoj kaj sonbendoj en Eo.

Dum la kurso difiniĝis profiloj de kursanoj, i.a. literaturisto, publicisto kaj kultura manaĝero. Kromaj bezonoj estis lokalizitaj, kaj tiujn ĉi aliaj partoprenantoj estas taskitaj esplori, cele al la kresko de la afrika Esperanta inteligencio.

La kursgvidanto, prof. Giorgio Silfer, havigis al la diligentaj AfrES-anoj studmaterialon kiu helpas al ili daŭrigi memlernadon hejme, sen gvidanto. Kaj kiel simblon memoraĵon pri sia partopreno, ĉiuj AfrES-anoj ricevis meksikan ŝlosil-iron, arte forĝitan en la entrepreno de la

E-familio Nájera (dek tri gefratoj!). Poste ĉiuj aŭguris organizi tian semajnon kun lernigo de almenaŭ unu el la kvin objektoj en sia respektiva lando aŭ en najbara.

Al la docento, kaj tra li al KCE kaj la Civita medio, kiuj disponigis monon kaj lernomaterialon por la sukceso de la aranĝo, la partoprenantoj de AfrES dankis finfine dum la lasta minuto antaŭ la disiĝo.

La sukceson de la aranĝo kompletigis, dum la lastaj du tagoj de la restado de prof. Silfer en Lomeo, fruktodonaj rendevuoj kun akademias aŭtoritatoj ĉe la universitato kaj ĝia biblioteko, intervjuo ĉe la loka radiostacio *Metropolis* kaj intervjuo ĉe loka ĉiusemajna gazeto.

Jen semiĝis la unuaj esperantologiaj grajnoj sur la nigra kontinento. Kaj nun la flegado kaj kresko de tiuj ĉi semoj dependas de la volo de ni ĉiuj akcepti la defion.

Ĉiuspecaj subtenoj, ĉu en aŭ ekster Afriko faros ke la agado de tiu nia generacio de unuaj E-kadroj estos pli videbla tra la tuta mondo.

Adjévi Adjé

Chamberline: la afrika Esperantio kreskos, se ankaŭ virinoj kreskos

Chamberline Nguefack Zedong, juna patrino el Kamerunio, estas la sola virino kiu trapasis la severan selektadon de KCE inter 27 kandidatoj por la unua AfrES: kaj ŝi sukcesis.

Sed mi ne sukcesus partopreni sen la financa helpo de Feminisma Esperanta Movado, ŝi tuj precizigas, dankeme. Feministino, vegetaranino, ekologiema, Chamberline Nguefack probable estos la afrika kandidato en la Verda listo, okaze de la elektoj por la Civita Senato, fine de 2006.

Sed pormomente ŝi ambicias ĉefe kiel esperantologo. Tuta fablaro estas prespreta (ĉe fondaĵo Hans), kaj ŝiaj artikoloj ekaperas en *Femina* kaj aliaj periodaĵoj transnaciaj.

Vizitonte Lomeon por AfrEs, mi havis du intencojn, diras Chamberlin: diligente kulturi miajn E-konojn kaj eventuale renkontiĝi kun samideanoj pri kiuj mi delonge aŭdis paroli.



Feliĉe, mi ne elreviĝis, ĉar ĉiuj miaj atendoj efektiviĝis. Mi ellernis i.a. pri sociologio de Esperantio (kion mi ja unuafoje malkovris), metodiko ktp. La docento havigis al mi lernomaterialon kiu helpas al mi poste en mia hejmlando daŭrigi la studadon pasie.

Ŝi aldonas malmallice: Krome, mi renkontiĝis, manĝis, amuziĝis, babilis kaj promenis kun tute afa-

blaj homoj sendepende de aĝo, sekso aŭ nacieco! Estis por mi ne forgesebla vojaĝo, mia restado en Togolando. Mi sentis min kiel en familio kaj faris belajn fotojn.

Dum mia restado en Lomeo, mi praktikis Eon pli vigle ol antaŭe. Tio aparte kontribuis al riĉigo de mia vort-trezoro, ĉar ĉiutage mi lernis novajn vortojn. Nun mi reiras patrolanden kun duobla kontentiĝo.

Fine, Chamberline Nguefack revenas al sia unua penso: Mi kaptas ankaŭ tiun ĉi okazon por esprimi miajn korajn dankojn al FEM, kies financa helpo ebligis al mi partopreni senprobleme la aranĝon. Mi esperas ke per mia laboro virinoj afrikaj havos pli da lokoj en Esperantio.

Almenaŭ en la Esperanta Civito, ĉiu pordo estas malfermita.

**ATISSO Kokou Eric (TG)****profilo: difinata**

Antaŭ ol veni al AfrES, mi jam partoprenis almenaŭ du seminariojn. Mi vidas grandan diferencon, ĉar AfrES estas eksterordinara pro sia multvaloreco.

Mi fariĝas nun esperantologo laŭ formado de c-ano Giorgio Silfer al kiu mi dankas. Kaj nun en mia nova vesto de esperantologo, aplikante ĉion kion mi ĵus studis, mi klopodos ne longe traduki kaj verki en Eon por alporti mian kontribuon al la E-literaturo.

DOUMEGNON Koffi (TG)**profilo: arkivisto/aktisto**

AfrES alportis multon al mi. Ne nur elimini lingvajn erarojn: mi enprofundiĝis en Eon, ideo kaj movade.

Nun mi kapablas klarigi funde la fenomenon Esperanto. Neniam mi tiel bone komprenis la veran historion de la lingvo. Tiu ĉi aranĝo estas ekirpunkto por novaj perspektivoj ne nur en mia E-vivo, sed ankaŭ en la aliaj kampoj. Aldoniĝas al miaj scioj la administrado de bibliotekoj, kiuj tuj helpas min mastrumi la lernejan bibliotekon de Instituto Zamenhof.

**GBEGLO Koffi (TG)****profilo: kultura manaĝero**

Jam dum la prepara fazo mi sentis, ke AfrES okazos sukcese. La kurso- gvidanto bone mastris la objektojn kaj la seminarianoj ege diligentis.

Nova generacio de E-istoj estis naskiĝanta en Afriko. Certe de Togolando tiu ĉi saniga vento atingos la ceterajn angulojn de la nigra kontinento. Sendube la unuaj AfrES-anoj portos la mesaĝon al aliaj.

AfrES regule okazu en Afriko por plilarĝigi la kulturalan horizonton E-an de Afrikanoj!

**ATTAGLO Kokou (TG)**

Tre interesa seminario. La aranĝo ebligis al mi scii pri multo, i.a. sociologio kaj metodiko; sed mi iel bedaŭras ke ne ekzistas vidbendo aŭ sonkasedo de tia kurso.


**profilo: andragogo**

Kvankam tempo terure al mi mankas pro lerneja okupo, jam nun mi verve laboros kampe de informado kaj ankaŭ por la realigo de esperantologia biblioteko en la universitato de Lomeo.

**ADJE' Adjévi (TG)****profilo: publicisto**

Neniu el la tri internaciaj seminarioj, kiujn mi partoprenis, kontentigis min kiel AfrES. Nin ĉiĉeronis dum plena semajno la movebla enciklopedio, nome docento Silfer. Certe mi ŝatus daŭrigi la esploron, sed mi malpravus se mi nun plendas ke la gvidanto ne trafis la celon.

Danke al la formado, mi fariĝas redaktoro de *Afrikume*, kaj tiu-maniere ekas aventuro por mi. En Tiu ĉi stato, mi povas nur esti feliĉa ĉar mi estos legata mondscale!

**ARTHUR Alfred K. (GH)****profilo: socia aktivulo**

Mi estas tre kontenta pri la seminario. Ĝi vere altigis miajn konojn pri kio estas Eo kaj ĝia kulturo. Tiujn ĉi konojn mi transdonos al aliaj aktivuloj en Ganao. Mia dank-esprimo iras al nia instruisto prof. Giorgio Silfer, kiu profunde konigis al ni la temojn.

Same, mi dankas al TIETo kiu kunorganizis la renkontiĝon, kaj ankaŭ al ĉiuj civitanoj kiuj finance kaj alimaniere subtenis la organizadon de AfrES.

KOUABLAN Antoine K. (CI)**profilo: literaturisto**

Taŭga la gastejo, vera majstro la instruisto. Mi aparte laŭdas lian meriton. Se tia persono frue venus al Afriko, nia kontinento atingus la civilajn rajtojn kaj egalrajtecon. Mi estas senfine danka al Eo kaj al la Civito kiuj sendis Giorgio Silfer.

Mi reiras al mia lando kun sama korpo, sed mense en alia vesto, ĉar mi konsideras min kiel rokon en la E-kulturo. Mi konas mian profilon kaj jam eklaboras tiukampe.

**ABA EKLU Abatévi (TG)****profilo: socia aktivulo**

Tre bone influis min la lingva flueco kaj parolmaniero de la docento. Li tiel bone kaj malrapide parolis, ke estis facile tuj kompreni kion li diras. Lia instruado estas ne riproĉinda.

Nun mi sentas min intelekta, energie pli forta kaj preta iri prediki al aliaj E-istoj kion mi spertis dum plena semajno. Mi konsciiĝas pri la identeca kaj kultura rolo de Eo. Mi ektravivas la realecon de la komuna destino de esperanta popolo.

AGBOLO Apéléte (TG)**profilo: administra kadro**

AfrES por mi signifas tutsemajna esplorvojaĝon tra Esperantio. Ĝi kondukis min enamiĝi al la E-kulturo historie, metodike... AfrES ebligis al mi fari plian paŝon, eĉ paŝegon al plena posedo de Eo.

La diversaj lernobjektoj instigas min elekti inter verkado, publikado kaj merkatesplorado mian futuran laborkampon en Esperantio.

Mi nur diras nun: ek al laboro, ni ĉiuj! Afriko bezonas nin por pezi en Esperantio.

**AGBASSOU Kouessanvi (TG)****profilo: difinata**

Bona studprogramo al trejniĝo de afrikaj aktivuloj pri E-kulturo. Ĝi vekis en mi entuziasmon por plu labori cele al la kresko de la nigra Esperantio. Tial mi promesas plibonigi mian lingvoscion kaj pli aktivi por la enradikiĝo de Eo en Afriko, verke aŭ traduke.

Mi esperas oftan okazigon de AfrES por ke la unua afrika esperanta inteligencio kresku kaj floru.



Silvestra nokto 2005: ĉu ni ne tostu ĝoje pri... la jaro baldaŭ for?

31 dec 05 instruistoj de Instituto Zamenhof, partoprenantoj en Afrika Esperantologia Semajno, gelernantoj de IZO kaj iliaj gepatroj, membroj de la estraro de la asocio de gepatroj kaj gastoj kuniĝis en la korto de la lernejo por celebri la jarŝanĝon.

La bela ideo venis el AfrES, kies eksterlandaj partoprenantoj kaj gvidanto tiel konatiĝis kun Togolandanoj kaj ties kutimoj. Reciproke, tiun nokton Esperantio vizitis nian landon.

Tiun tagon AfrES ne tute dediĉis al lernado. Matene la klasĉambro funkciis, dum la ceteraj horoj de la tagoj odoris festece. Jam je la kvara gelernantoj kaj instruistoj ordigis seĝojn kaj tablojn rektangle sur la korto. Je la naŭa ekvenis homoj kaj ĉ. la deka komenciĝis la festo.

Gbeglo Koffi prezentis la festoprogramon al pli ol 60 personoj. Bonvenigo de la pedagogia direktoro, Kokou Evienyame Attaglo, dankvortoj de la sekretario de la asocio de gepatroj Kossi Djiffa Kossivi kaj prezentado de Giorgio Silfer sin sekvis.

Attaglo klarigis la kialon de la festo, menciante ankaŭ pri la Esperantologia Semajno. Kossivi bonvenigis c-anon Giorgio Silfer, kaj tra li dankis ĉiujn eksterlandanojn, kiuj ĉiel klopodas, ke Instituto Zamenhof bone funkciis. Prof. Silfer parolis pri la estiĝo de la lernejo, pri AfrES kaj pri la klopodoj faritaj kaj farotaj por bone funkciigi la lernejon. Fine de tiu ĉi parolado la ĉeestantoj aliris la tablon centre de la rektangulo: tie ĉiu prenis la plej ŝatatan trinkaĵon – biskivitoj kaj arakidoj ĝin akompanis. Muziko intermiksiĝis por agrabligi la etoson. De Giorgio ni lernis ludon pri seĝodanco, kiu donis plian aromon al la kunesto.



Patrinoj kaj lernantinoj multe amuziĝis dancante okaze de la jarfino. La jul- kaj lulkantoj el kasedoj de Nikolin' agrabligis la noktofeston per specifa esperanta etoso.

Ne mankis dancoj: Adjévi Adjé, Kouessanvi Agbassou, Alfred Kobina Arthur, Gbeglo Koffi, Chamberline Nguefack, Giorgio Silfer kaj aliaj miksiĝis al la gelernantoj kaj iliaj gepatroj. Neniu povis distingi el la moviĝantaj piedoj, kiuj apartenis al AfrES-anoj kaj kiuj al gepatroj.

La estraro de la gepatra IZO-asocio kaptis la okazon por disponigi al la plej eminenta gasto sian saluton per simbola donaceto. En tiu ĉi etoso pluiris la festo, ĝis alvenis la kuko de la jarŝanĝo.

Ronda aĝego kuŝis sur la tablo centra. Sur ĝi: *Institut Zamenhof, Bonne Année 2006*. La partoprenantoj de la novjara festeno ĉirkaŭis la tablon. Giorgio invitis la afrikan eksterlandaninon Chamberline, kiu tranĉis la kukon je la aplaŭdo de ĉiuj.

Tranĉaĵon post tranĉaĵo ŝrumpiĝis la kuko, dum moviĝis la lipoj de la festantoj. Pluiris dancado, kaj disiris partoprenantoj. Kelkajn minutojn poste alvenis noktomezo. Bolis la instituto per ĝojkrio de la festantoj, kiuj salutis unu la alian novjarfone.

Finiĝis la festo, kaj malaperis ankaŭ la rektangulo el seĝoj kaj tabloj. Ĉiuj, ankaŭ Giorgio, laboregis metante la seĝojn kaj tablojn en ties respektivajn klasĉambrojn.

Finiĝis la festo, kaj post tri tagoj finiĝos AfrES. La festeno novjara certe gravuriĝis en la kapoj de multaj, kiuj neniam forgesos la eminentan docenton Giorgio Silfer, kiu tute humile kaj dinamike mirigis ĉiujn. La deziro de ĉiuj estas, ke li pliajn fojojn kunfestu novjare en Togolando.

Gbeglo Koffi

Afriko havos en la universitato de Lomeo sian esperantologian bibliotekon



La Afrika Esperantologia Biblioteko situos en simila angulo de la ĉefa legosalono de la universitata biblioteko en Lomeo. AEB povos havi la nomon de helpema mecenato.

Ni profitis la ĉeeston de Giorgio Silfer por kontakti universitatajn aŭtoritatojn en Lomeo, por faciligi esperantologiajn aferojn en Togolando. Unuavice ni vizitis la universitatan bibliotekon. Ni ambaŭ estis rapide

enkondukitaj al la direktorino, al kiu prof. Silfer sin prezentis kaj klarigis la projekton pri instalado de esperantologia sekcio kiel speciala fako de la universitata biblioteko. Li diris: *Havi bibliotekon en universitato es-*

tas duoble oportune: ĝi estas alirebla de kompetenta publiko kaj pli bone prizorgata; kaj ĝi povas funkcii por la tuta Afriko per la interpretanta servo.

La direktorino tre ĝojis pro la projekto, kaj faris multajn demandojn al prof. Silfer. Pro baldaŭa vojaĝo al Francio kadre de Unesko-programo, ŝi volonte akceptis la inviton de la Esperanta Civito (en kies kadro okazos la projekto) viziti similajn specialajn fakojn en la urba biblioteko de Ĉaŭdefono kaj en la universitato IULM en Milano.

Kvankam la Afrika Esperantologia Biblioteko komence estos multe pli malgranda ol la menciitaj en Eŭropo, la direktorino bedaŭris, ke ŝi ne havas sufiĉe da spaco en la universitata biblioteko. Tamen, irinte kun ambaŭ vizitantoj tra la tuta biblioteko, ŝi sukcesis fine lokalizi por AEB agrablan angulon.

La tuta projekto estas sur bonaj reloj. Ni esperas ke jam en 2007 eblos inaŭguri ĝin. Surloke responsas pri la projekto

Kokou Attaglo

Afrikume estas bela eksperimento, kiu naskiĝis por subteni la unuan Afrikan Esperantologian Semajnon. La aranĝo havis sukceson, sed ankaŭ deficiton: 2.800,- CHF. Helpi por kovri tiun deficiton signifas investi por nia lingvo kaj ĝia kulturo en Afriko.

Donacojn KCE akceptas ĉe sia poŝta konto 23-2921-8 en Svislando kaj tra la kontoj 9868KCE en la Civita Banko aŭ *Ifoi-i* (jes: *Ifoi-i*) ĉe UEA. Ni bezonas centon da etaj donacantoj por prepari la duan Afrikan Esperantologian Semajnon. Ĉu vi ne estus inter ili?

Ckrist Bardol: Mi kantos esperante

Bardol estis la iama Bad Boy de la togolanda pop-muziko. Mi renkontis lin hazarde, gaston ĉe elviva radioelsendo kiel mi.

Ckrist Bardol eniris novan periodon de sia artista vivo: lia varma, vibranta voĉo en perfekte flua franca (kiu rememorigas tiun de nia Max Roy Carrouges, sed kun eĉ pli mediteranea sonoreco) respondis al demandoj pri lia lasta KD. Anime fidela al virinoj malfidelaj, almenaŭ en siaj kanzonoj, Bardol parolis pri amo.

Muziko kuplis la intervjuon al mi: *La esperanto-knabino* de Nikolin' persvadis lin ke nur la lingvo mankas, por universaligi liajn partiturojn; kaj mi promesis helpi.

La propono estas produkti diskon kun voĉoj el kvin kontinentoj, sed en unu lingvo – esperanto. Ĝuste Ckrist Bardol povos reprezenti Afrikon, kun ĝia vivoĝojo kaj eĉ vivoĝuo, sed kun filigrano de pudoro por la propraj sentoj, preskaŭ de timideco – ne antaŭ la korpo, sed vidalvide al la animo.

Giorgio Silfer



Ckrist Bardol kaj Giorgio Silfer en la studio de Radio Metropolis, Lomeo: ĉu nova muzika kunlaboro baldaŭ ekestos en Esperantio?

Adoptu nevon en Institut Zamenhof

Cent sesdek infanoj de la sesa ĝis la dekkvara jaro. Ili ĉiuj lernas ankaŭ nian lingvon. Unika eksperimento, kiu rememorigas pri la lernejo de Somero en Finnlando antaŭ preskaŭ duona jarcento.

La lernejo estas en Togolando, en periferia kvartalo de Lomeo, kie mankas infrastrukturoj. Ĝi estas kiel oazo ene de ladvilaĝo, margene de la ĉefurbo. Kaj ĝi bone funkcias.

La aliĝkotizo estas modera: 80,- svisaj frankoj por tuta jaro. Sed multaj familioj penegas aŭ entute ne sukcesas pagi tiun kotizon. Kial vi ne adoptu esperantan nevon en Institut Zamenhof? Sufiĉas sendi 80,- CHF al la konto 9704TIE ĉe *Pro Esperanto*, poŝta konto 23-4803-0, Svislando. Por pli da informoj: <pakto@esperantio.net>

Via esperanta nev(in)o estos elektita inter la plej malriĉaj kaj samtempe la plej sukcesaj en la lernado de Eo. Vi povos korespondi kun li aŭ ŝi, rete aŭ per ordinara poŝto, se vi deziras. Ĉiukaze, vi rajtos peti de la lernejestro informon pri la evoluo de tiu infano, fine de la lernojaro.

La infanoj, vervaj sed respektemaj, en siaj uniformoj kun blanka ĉemizo kaj verda pantalono aŭ jupo, estas vere lernemaj. Ne hezitu helpi al tiuj infanoj. La Tria Mondo estas jam en Esperantio.

Marie-France Conde Rey
Vickonsulo pri socialaj aferoj

Zamenhofa Festo 2005 en Kpeme

Informkaravano, prelegoj, radio-elsendo, kvizo, futbala maĉo kaj kunmanĝo arigis pli ol 70 geE-istojn el tri landoj je 30 km oriente de Lomeo. Pruvo ke la organizantoj de tiu aranĝo, la junulara sekcio de la landa asocio, multe interesiĝas pri la praktikado de Eo en ĉiuj anguloj de homaj aktivecoj.

Plej rimarkinda sukceso de la evento venis el informkampanjo. Tra ĝi E-gejunuloj iris sur stratoj de la urbeto Kpeme renkonte al ties loĝantoj. Al tiuj ĉi ili parolis pri Eo kaj ĝia praktika utileco, kaj ili invitis la popolon al la lingva studo. Okazis ankaŭ disdono de flugfolioj kaj reklamiloj kun la kontaktindikoj de la Organizo.

Dum prelego pri la vivo de Zamenhof s-ro Kodjo Sedjro, sekretario de la Junulara Organizo, klarigis al publiko konsistanta el ne- kaj E-ista tavoloj, kiel malgraŭ persekutoj Zamenhof verve laboris por la realigo de sia lingva projekto. Aldone, la oratoro emfazis kiel estas celebrata la Tago de la E-Libro kaj invitis la gastaron al respekto de E-tradicioj.

Aliaj du membroj Kokou Attaglo kaj Adjévi Adjé gvidis unuhoran debaton pri Eo kaj la agado de ties parolantoj tra la mondo, aparte en Togolando. Tiu ilia interveno ĉe loka radio *Metropolis* vekis scivolemon ĉe la aŭskultantaro. Deko el ili telefone partoprenis la elsendon per demandoj, ricevante kontentigajn respondojn. Kaj tial ili sugestis la okazigon de lingva kurso sur la ondoj de la radio.

La feston fermis piedpilka ludo vespere, dum kiu iuj festantoj, unuafoje, surmetis ludŝuojn por iom futbali. Tio naskis konstruivajn amikajn rilatojn inter ambaŭ teamanoj, kiuj post la fino de la maĉo reciproke premis manon kaj manĝis ĉe la sama tablo. AA

Ĉiuj E-laboroj en Institut Zamenhof estos enkadrigitaj en la alo "ACE" (Afrika Centro Esperantista). Nek ACE nek IZo estas partoj de iu alia organizaĵo. Ili estas memstaraj, kaj volas resti tiaj. ACE havas sian lokon en la vasta afrika agado nun ekzistanta.

ACE plu laboros pri la samaj taskoj kiujn iam mi mem faris. Ĝi korespondas kun ĉiuj afrikaj E-istoj, klopodos trovi solvon al iliaj problemoj, disponigas kursojn kaj diplomojn al ili, trovas korespondantojn por ili, kunlaboras kun/servas al ĉiuj E-istoj tra la mondo.

Klubo kaj landaj asocioj, eĉ unuopuloj, kiuj ŝatus efektiviĝi planon pri disvastigo de Esperanto en Afriko, ne hezitu kontakti ACE. Tiu ĉi foje povos eĉ helpi laŭ sia kapablo solvi privatajn aferojn de E-istoj.

Tiom kiom mi pluhavas energion por labori mi partoprenas en la laboroj de IZo, ACE kaj UEA.

Por Eo en Afriko, vi povas turniĝi al UEA, sed ankaŭ al ACE. Tiu ĉi estas proksima al afrikanoj kaj bone komprenas ilin.

Progresu Eo en Afriko, kaj kresku E-kulturo sur la kontinento. Jen en kelkaj frazoj resumiĝas la celo de ACE.

Hans Bakker




FOTO GEELLEN